Aaron David Irvine,

De sango al ŝanĝo

Bonkoraj feliĉstrebantoj tre multas,
Sub lumo sune beloranĝa,
Sur lando suke belverdega;
Tia bunta kulturparo vivigus,
Sed gutas la sango.

Bonegaj donacaĵoj nin abundas,
Merkat' mizeras ne ĉiloke,
Natur' neglektas ne ĉitempe;
Utopie ridriĉaj ni fariĝus,
Sed fluas la sango.

Bonoreloj entimbruaj jam surdas,
Puŝadas moroj nin fieĥen,
Baldaŭas paco nur voĉdonen;
Ja peace-síocháin-on kune ekatingus,
Se pretus al ŝanĝo.

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Aaron David Irvine, publikigita 1994-07.

Arg-1103-2228 (2014-12-18 23:32:59)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi poemon en 2014-12-18 de s-ro Aaron David Irvine (reta adreso: irvdel@gmail.com).